# TKKE informas

No I.   N o v e m b r o 1955 Aperas laŭbezone

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

En la numeron kontribuis: R. Burda, J. Csader, J. Kořínek, J. Kožený, A. Kremer , Dro I. Lapenna, J. Mařík, Dro V. Mohapl, Dro T. Pumpr, M. Rudolf, J. Slivka, Ed. Tvarožek, J. Vítek.

KOMPLETA LISTO DE TKKE FUNKCIULOJ, kiuj estas je dispono de ĉeĥoslovaka esperantistato:

prezidanto : Josef Vítek, Praha II., Jungmannova 24, telefono. 23 83 23
sekretario : Miloš Rudolf, Wanklova 14, Olomouc
kasisto : Karel Fabián, Komenskeho 22, Olomouc
junularo : Jaroslav Mařík, Malá Štěpánská 9, Praha II.
preso : Jan Lamačka, Pod Sokolicami 1675, Trenčín
Dro Vladimír Mohapl, tř. Svornosti 4, Olomouc 4.
porpaca sekcio : Rudolf Burda, Palackého nám. 6 Plzeň
František Lička, Břczí 12, Ostrava-Zábřeh
Vlad. Slaný, Kutuzova 29, Ostrava-Vítkovice
M. Evjáková, ZK ROH Svit, krouzek Esperanta, Otrokovico
organiza sekcio : Josef Kožený, profesoro Kutná Hora
Václav Špůr, Moskevská 354 Doksy u Máchova jezera
Ota Ginz, Nad cementárnou 10 Praha-Podolí
Jaroslav Šustr, Dlouhá 10 Praha I.
Fan Matušová, Krátka 812, Otrokovice
lingva sekcio : Dro Tomáš Pumpr, Thälmannova 8 Praha-Bubeneč
Dro Stanislav Kamarýt, Choteboř
Jiří Kořínek, Merhautova 159 Brno 14
Josef Vondroušek, Botanická 31, Brno
Theodor Kilian, Příční 318, Třebíč
Vuk Echtner, Soudní 16, Praha 14 (blindulaj aferoj)
slovaka sekcio : vicprezidanto: Eduard V.Tvarožek, Hviezdoslavova 3, Martin
anstataŭanto: Aug. Ĉambál, Pri Sokolovni K 3-8/36 Martim.
lingvo kaj literaturo : Ján Valašťan Dolinský, Hliník 108, okr. Pezinok
kontakto kun SOR kaj centraj oficoj : Pavel Rosa. Vlčkova 46, Bratislava
instruado, kursoj, lernolibroj,
kluba vivo : D-rino Magda Seppová, Vlčkova 53, Bratislava
junularo : Milan Zvara, Mýtna 45, Bratislava.

TKKE ALIĜIS AL UEA. Post interkonsento (s. Kožený, Rudolf, Tvarožek, Vítek) kiel provizora landa asocio TKKE aliĝis al UEA.

TKKE, la konferenco de Esperantistoj-Pacdefendantoj en Otrokovice, Somera Kolegio de Esperanto en Doksy, Esperantista Klubo en Praha kaj ceteraj organizaĵoj sendis petleterojn al legacioj dana, norvega kaj sveda en ĈSR pri esperantigo de turistpropagandaj filmoj.

TKKE INFORMAS 1-1955-

Pri esperantigo de filmo estis petita Ĉsl. ŝtata pupfilmo (dramaturgie) kaj esperantigo de niaj operoj Gramofonové závody en Praha.

USA transdonas la Rezolucion de la UK en Bolonja pere de soveta ambasadoro en Stockholm al la Soveta registaro en Moskva.

Internacia konferenco de Komercĉambroj akceptís. la proponon sendi rezolucion al UNESCO proponante la enkondukon de Esp. en la komercajn lernejojn. --

Samideanajn salutojn kun 37 subskriboj (inter ili de J. Baghy, P. Balkányi k.c) sendis Landa Pac-Arnika Esperanto-Renkonto, Budapest-18.9.1955. Ni sincere gratulas al niaj hungaraj samideanoj.

En Dem.Vietnamio en proksima tempo estos fondita MEM-sekcio.

Julio Baghy fariĝis prezidanto de budapeŝta klubo, kiu estis fondita ĉe la kulturdomo. Ankaŭ en aliaj hung. urboj jam aktivas legalaj grupoj.

S-ano Bokarev vigle laboras kontaktante kun alilokaj gek-doj por fondi Sovetan Esp.Pacmovadon en proksima tempo.

Slovaka eldono de KON-TIKI. Belaspekta libro kun ankoraŭ pli multaj ilustraĵoj ol enhavas la E.eldono. Enkonduke estas notite, ke la traduko en slov. lingvon estis farita de E.V.Tvarožek el traduko Esperanta. La prezo estas 20,60 por bindita volumo. Eldonis Osveta, Martin. La interesegan libron ni varme rekomendas.

Laborkunvenon de E-rondetoj ol regionoj Ostrava kaj Olomouc en Opava la 18. 9. 1955 partoprenis 38 delegitoj el 13 lokoj. Prelegis:F. Lička, Drah. Kocvara kaj VI. Slaný.

Laborseminario en Ostrava 24-30. 10. 1955 ĉe ZK. VŽKG, Ostrava 10-Zámek. Prelegas:Janouš, Kočvara kaj Čermák el Ostrava, Rudolf kaj Dro Mohapl el Olomouc, Kořínek el Brno, Bendová el Praha. Fervojrabato 50%a. Aliĝu al: Ladislav Adámek, Poruba u Ostravy, Hornická 304.

| | |
|---|---|
| Novaj rondetoj: | Bratislava ĉe Kleriga domo (ĉiudimanĉe 9,30-12a horo<br>Kultura domo, Fučíkova 3, I. etaĝo, Redouto de Carlton,<br>adreso Ján Slivka, č. i. 93, Belojanisa 6, Bratislava.<br>Žďár nad Sázavou ĉe Osvětová beseda.<br>Rýmařov ĉe Kultura domo kaj Jeseník ĉe Kultura domo. |
| Novaj kursoj: | Košice: komoncantoj 37, progresintoj 10-gvidas A. Kremer<br>Praha: infanoj 10, komencantoj 21, progresintoj 11-gvidas<br>E. Řiháčková, A. Slanina, E. Suchardová.<br>Rýmařov kaj Jeseník, precizaj informoj mankas<br>Ždár nad Sázavou , gvidas s. Březina<br>Brno: komencantoj 20, gvidas s. Vondroušek |

Ĉeĥa porblindula gazeto ZORA denove favoras Esperanton. Esperantlingvan aldonon AŬRORO redaktas V. Echtner. La redakcio lin komisiis ellabori flugfolion kun oferto al blindulaj esperantistoj en eksterlando.

Pri nia movado informas grandskale lastaj numeroj de Heroldo de Esp. kaj de jugoslava gazeto Kontakto. La lasta proponas larĝan kulaboron, kiun ni sincere bonvenigas.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Kontribuojn sendu al Dro Mohapl aŭ al J. Vítek. Respondeca pri la enhavo: Josef Vítek, Jungmannova 24, Praha II, ĈSR.